

SASAKI Teruhiro

ĈINA LINGVA REFORMO KAJ ESPERANTO

(侯志平主編『中国世界語運動史』、新星出版社、北京、2004年 *Konciza Historio de la Ĉina Esperanto-Movado* によせて)

エスペラントは中国語で「世界語」という。これは二葉亭四迷の訳語を引き継いだものだ。日本が中国に与えた影響の深さをこの「世界語」という名称が物語っている。日本を横目で見ながら、かつ世界を視野に入れて、中国の「世界語」運動の志士は自国の目の前の課題として中国語改革を志向した。複雑化した漢文、多岐にわたる方言を「普通話」に統一する運動、及び発音統一ローマ字化運動に彼らは直接に関わった。人民の教育普及と先進文明導入にそれが不可欠であったからである。エスペランチスト蔡元培、銭玄同、呉稚暉、瞿秋白、胡愈之、葉籟士はその運動の先駆者となった。1927年4・12政変後蒋介石国民党は世界語を敵視しピンインを中国語の伝統破壊とみなすが、共産党は有益と見た。瞿秋白はピンイン考案を「中国語のエスペラント化」と呼んだほどである。エスペランチスト葉籟士は中華人民共和国の文字改革委員会副委員長であった。そのことは世界語が中国語改革の触媒であることを示している。現在中国のどんな僻地にいても普通話に通じる。またローマ字入力によって中国語ワープロができる。これはローマ字化、つまりピンインのおかげである。中国語改革における世界語運動者たちの功績は極めて大きい。

Pro la malvenko en la Japan-Ĉina Milito (1894-95) Ĉinio alfrontis la seriozan danĝeron de koloniigo. Jen aperis inter la ĉinaj prudentaj intelektuloj la reforma penso pri lernado de la Okcidento por fortigi Ĉinion. Unu el la manifestiĝoj de la penso en kulturo estis reformado de ĉinaj ideogramoj. En la revolucio en 1911 oni prezentis popularigon de eduko kaj disvolvon de kulturo, tial la ĉinaj ideogramoj videbligis siajn mankojn, kiaj multe da strekoj, sennombraj unuopaj ideogramoj, nefonestima elparoro kaj malfacila lernado, kio estis rigardata siatempe kiel ĉefa obstaklo por pluapaŝe disvolvi la ĉinan kulturon. Kaj en la tajdo de la nova epoko komenciĝis la movado de reformado de la ĉina lingvo.

Ĝuste en tiu epoko Esperanto estis enkondukita en Ĉinion. Esperanto naskiĝis rafinite sur la bazo de latin-german-slava lingvoj, tamen ĝi estas pli simpla, pli scienca kaj pli racia ol la lastaj. Laŭ aŭtoro de la “*Konciza Historio*” diris,

“Iasence ne estas senkaŭze, ke la Esperanto-movado kaj la reformado de la ĉina skriblingvo havas ion komunan, helpas unu la alian kaj influas sin reciproke”. [1:66]

La Movado de la 4-a de Majo en 1919, okazinta kiel protesto kontraŭ la 21 postuloj de Japanio al Ĉinio, estis kaj politika revolucio kaj kultura revolucio. Oni prezentis ne nur la sloganon de literatura revolucio, sed ankaŭ la sloganon de ideograma revolucio. La

reformado de la ĉina skriblingvo fariĝis konsistiga parto de la Majo-kvara Novkultura Movado. La novkultura movado estis por nova literaturo kaj kontraŭ la malnova, por populara lingvo kaj kontraŭ la klasika kaj por latinigo kaj kontraŭ ideogramo.

La diskuto pri la reformo de ĉina lingvo publikiĝis serie en la gazeto “Nova Junularo” 『新青年』. Qian Xuanton 錢玄同 lernis Esperanton en Japanio ĉe Oosugi Sakae 大杉栄. Reveninte el Japanio, li ekagadis aktive kiel eminenta lingvisto. Li trovis Esperanton ideala lingvo kaj ekstremege proponis anstataŭigi la ĉinan lingvon kaj ĉinajn ideogramojn per Esperanto, agnoskante provizore la latiniĝon almetitan al ideogramoj kiel procesa etapo. Li asertis sekve.

“Ĉina nacia lingvo ne estas sufiĉa por esprimi novan civilizon, sed eĉ per aliaj fremdaj lingvoj ne plenumata bone kaj bele tia celo, tial ne estas alia remedo ol uzi Esperanton. Esperanto estas plibonigita eŭropa lingvo, kompleta kaj belega lingvo, kreita de la filantropa s-ro Zamenhof. Ni, ĉinoj, devas forĵeti la rudan, malkonvenan oldan lingvon, same kiel demeti la arkaikan tropufigitan veston, ni devas ekmeti novan konvenan veston kun mallonga maniko.” [2:211]

Chen Duxiu 陳独秀 subtenis tian opinion kaj skribis en la letero de 1 de junio 1917.

“Esperanto estas sama kiel nia (ĉina) lingvo, ĝis nun ĝi ankoraŭ ne naskis grandan literaturon, sed finfine ĝi estos uzata por literaturo. Mi absolute konsentas ke Esperanto anstataŭos anglan lingvon. Se la eduka mondo de nia lando kune iros al la nova ideo, tio mirigos okcidentan popolon. Esperanto en nia lando certe disvolviĝas, kaj ĉiuj ĉinaj gravaj vortoj povos esti legotaj en la Esperantaj libroj. Tiam oni eksportos ilin en aliajn landojn kaj Esperanto mem superos nuntempan Esperanton, uzatan nun en Eŭropo kaj Usono.”[2:25]

Laŭ Chen Duxiu, per la Esperanto ĉina civilizo estos eksportota en tutan mondon. Tion revis ĉinaj Esperantistoj. Poste Hujucz 胡愈之 sekvis opinion de Qian Xuanton, kaj diris.

“Plej grandaj difektoj de ĉina nacia lingvo kuŝas en la gramatika neperfektaĵo, konstrua malracio kaj limigo de vortofarado. Sed Esperanto estas la plej logika kun plej kompleta gramatiko, riĉa vortfarado, tial Esperanto unu povas fakte kompletigi nian nacian lingvon.”[4:298]

Sed tamen multe da oponentoj kontraŭstaris al Qian Xuanton. Kritikoj al Qian Xuanton estas ĵetitaj en sekvantaj punktoj, ĝuste samaj kiel nuntempe kontraŭ Esperanto.

- 1) Esperanto estas artfarita lingvo, tial ne havas naciecon.
- 2) En Esperanto estas multe da vortoj, anglaj, francaj, germanaj, sed tute ne troviĝas orientaj vortoj. Tial Esperanto ne havas rajton por nomiĝi la monda lingvo 世界語.

3) En Britio en la komercaj lernejoj Esperanto estis eliminata el lernoobjektoj, en Usono tre malmultiĝas lernantoj, tial Esperanto jam estas morta artfarita lingvo.

4) Ĉu havas literaturan valoron la literaturaj verkoj, skribitaj en Esperanto?

5) Oni diras, ke “post lernado de Esperanto estos pli facile ellerni anglan, francan kaj germanan lingvojn”. Sed se kalkuli tutan tempon, oni ne povas ŝpari tempon.

6) Onidire gramatiko de Esperanto estas facila. Ĝi estas facila, ĉar ankoraŭ ne sufiĉe disvolviĝas. Se diversaj homoj praktike uzos kaj kreos diversaj novaj vortoj, ĝi fariĝos malsimpla kaj kompleksa.

([2:230-241], “Nova Junularo”, vol.5, numero4, 1918, 15 de oktobro)

Kritikoj kontraŭ Esperanto estis esprimataj en multediversaj flankoj. Interesa estas respondo pri 2-a temo. Qian Xuanton skribis sekve.

« Termino 世界語 (monda lingvo) estas la japana traduko de Esperanto. Kvankam tiu-ĉi traduka nomo antaŭe aperis en Japanio, tamen nun estas uzata termino “Esperanto エスペラント” per katakanao, ĉar laŭ la opinio de novaj sciencistoj ĉina ideogramo ne taŭgas por la nova civilizacio. Tial eĉ japanoj forĵetis ĉi-tiun ideograman nomon (世界語).”[2:171]

Qian Xuanton mem ne estas kontenta por la termino 世界語 kaj li senpere uzas terminon “Esperanto”, ĉar li mem kampanjas kontraŭ ideogramoj. Malgraŭ tio la forlasita de japanoj nomo 世界語 estas fikse enradikiĝas ĝis nun en Ĉinio. Hutabatei Shimei ankoraŭ vivas en Ĉinio kun la vorto “monda lingvo” 世界語. Tio estas profunde kurtuŝita por ni, kaj samtempe oni povas senti la fortecon de ideogramoj. Estas mirinde ke ĉinoj uzas la terminon, forlasitan de japanaj Esperantistoj. Mi pensas ke la ideograma nomo de Esperanto 世界語 estas la preciza simbolo por unuiĝo de nacieco kaj internacieco, de okcidento kaj oriento.

Koncerne al 1-a kritika punkto Tao Lügong 陶履恭, oponento kontraŭ Esperanto, skribis, „Generala tendenco en la mondo estas tia, ne eblas detranĉi naciecon, ne eblas forĵeti nacian lingvon.” [2:103](15 de februaro 1918)

Tao pravas, ke nacieco estas pli forta ol internacieco, ĉar en tiu tempo (kaj ĝis nun) ĉiuj landoj serĉas sian propran profiton. Ĉinaj Esperantistoj ankaŭ devas strebi al la plibonigo de ĉina nacia lingvo kiel siatempa celo. Tial ili mem okupiĝis pri latiniĝo de ĉina lingvo kiel urĝa tasko. Esperanto kaj latiniĝo de ĉina lingvo ĉiam estis diskutataj ambaŭ samtempe. Oni konsideris latiniĝon kiel Esperantigo de ĉina lingvo.

: Zhu Wonong 朱我農 malkonsentas ankaŭ al latiniĝo, ĉar laŭ lia opinio japana lingvo malsukcesas alligi sonon al ideogramoj.

“Ne ripetu japanan malsukceson. Pasis jam 800 jaroj post kiam Japanio inventis kanaon por fonogramo. Sed ne troviĝas bona rezulto, kontraŭe granda estas malbono.

Nuntempe multe da akrevidaj japanoj strebas anstataŭigi ĝin per latiniĝo, sed ne povas sukcesi.”[2:226]

Kontraŭ Zhu asertis pri la merito de kanao-fonogramo Qian Xuantonĝ sekve.

“Mi dubas tian opinionon ke rekte lerni ideogramon estas pli facile ol lerni kun almetita prononco. Por ekzemplo japanoj vidas leteron “monto 山” kun almetita noto “ヤマ”, kaj ekkonas signifon de la letero “monto 山”. Sciante signifon, oni memoras la formon de la ideogramo. Se ne estus noto “ヤマ”, oni eterne ne povus scii kion signifas la ideogramo 山. Por scii leteron, oni unue ricevas ĉiam sonon, poste ekkonis formon de la letero. Ĉiuokaze, kaj ĉina, kaj japana, kaj eŭropa leteroj estas same tiel. Mi opinias ke kanao en Japanio fakte helpas al japanoj scii ĉinan ideogramon.” (6 de oktobro 1918, p.222)

Qian Xuantonĝ aldiris, ke “la diskuto en la japana societo Romaji (Latina letero) estas sugestodona”. [2:225]

Tiuj diskutoj malfermis la vojon al la reformado kaj sekve de tio aperies la nova tajdo de latinigo. De 1923 s-roj Qian Xuantonĝ 錢玄同, Zhao Yuanren 趙元任, Li Jinxi 黎錦熙 kaj aliaj publikigis disertaciojn kaj diris: “Necesas revolucio por la ĉina skriblingvo!” “Se ne, eduko absolute ne populariĝos, la ĉina lingvo absolute ne estos unuigita, la ĉina lingva literaturo absolute ne plene disvolviĝos, kaj novaj teorioj, novaj kleroj kaj novaj scioj, kiun posedas la tuta homaro, absolute ne povas esti facile kaj libere skribitaj en la ĉina lingvo.” [1:67]

Ili opiniis: “Nepre necesas fonetika skribo por deradikale reformi la ĉinan skriblingvon.” En 1924 ili ellaboris “Projekto de Romana Fonetiko de la Ĉina Lingvo.” En 1928 s-ro Cai Yuanpei ekfunkciis la projekton, kaj tiel komenciĝis la larĝsenca movado de latinigo, inkluzive de la posta latinigo de la nova ĉina skriblingvo. [1:67]

Antaŭ kaj post la movado de la 4-a de Majo la E-movado ricevis grandan disvolviĝon en Ĉinio. La movado estis subtenata de multaj famaj personoj, inter kiuj troviĝis fama pensulo kaj edukisto Cai Yuanpei 蔡玄培, fama lingvisto Qian Xuantonĝ 錢玄同, famaj verkistoj Lusin 魯迅 kaj Zhou Zuoren 張作人, Chen Duxiu 陳独秀, unu el la fondintoj de KPC 中国共産党, frutempaj KPC-gvidantoj Yang Xianjiang 楊賢江, Yun Daiying 惲代英 kaj Qu Qiubai 瞿秋白 kaj veteranoj de Kuomintango Zhang Ji 張繼, Wu Zhihui 吳稚暉 kaj Jing Meijiu 景梅九. Bedaŭrinde post de 12-a de aprilo, kiam Ĉjang Kajŝek 蔣介石 ekbuĉis komunistojn en Ŝanhajo, ĉinaj Esperantistoj estis disfendigitaj. Cai Yuanpei kaj Wu Zhihui subtenis Ĉjan Kajŝek. Komunistaj Esperantistoj turnis sin al la reformado de ĉina lingvo kiel la urĝaj bezonoj.

Fama komunisto Qu Qiubai 瞿秋白, kiu poste estis mortpafita de Kuomintango en 1935, longe esploris la problemon pri reformado de la ĉina skriblingvo. Komence de la 20-aj jaroj de la 20-a jarcento li konatiĝis kun Esperanto kaj aprobis la idealon de Esperanto,

propagandante aktive ĝin. En kreado de novaj latinigitaj vortoj li asimilis superecon de Esperanto kaj ellaborante la projekton de la ĉinlingva alfabeto li prenis tiun de Esperanto. En 1929, en Sovetunio li ellaboris la projekton “Latinigitaj Literoj de la Ĉina Skriblingvo”. Ĝi eldoniĝis en Moskvo kiel la plej frua projekto de la latinigo de la ĉina skriblingvo. Qu Qiubai skribis, ke «oni povas nomi novan ĉinan literon Esperantigita ĉina». [3:426]

“Fonogramo de la nova ĉina alfabeto prenas sian normon ĝenerale laŭ Esperanto, aldoninte kelke da ŝanĝiĝon. Tio igis la novan ĉinan lingvon ricevi multe pli facile novajn fremdajn vortojn. La prononco kaj la skribado estas komplete egala al Esperanto, tial oni povas diri ke la nova ĉina lingvo estas Esperantigita ĉina. 「Esperanto 化的中国文」 (1932 新中国文草案) [3:428]

Siatempo en Sovetunio disvolviĝis la movado de la latinigo de skriblinbo por likvidi analfabetecon inter la naciminoritanoj 文盲撲滅運動. Tiam ĉ. cent miloj da ĉinaj laboristoj-analfabetoj vivis en ĝi, precipe en ĝia regiono de Ekstrem-Oriento.

Post diskuto de ĉinaj kaj sovetuniaj erudiciuloj la ĉinaj fakuloj Wu Yuzhan 吳玉章, Lin Boqu 林伯渠 kaj Xiao San (Emi Siao 蕭三), helpe de la sovetunia filologo A. A. Dragulov kaj surbaze de la projekto ellaborita de Qu Qiubai, elfaris projekton de la latinigo de la ĉina skriblingvo.

En 1931 okazis en Vladivostoko la Kongreso de Latinigo de la Ĉina Skriblingvo. Wu Yuzhang faris raporton en ĝi. En la kongreso estis aprobitaj “La Principoj kaj Reguloj de Latinigo de Ĉinaj Ideogramoj” kaj projekto de la ĉina nova skriblingvo. Oni faris likvidon de la analfabeteco inter la ĉinaj laboristoj per la latinigita nova skriblingvo, kun bona rezulto. Pro tio, ke Ĉinio kaj Sovetunio tiam ne havis diplomatiajn rilatojn, la informo ne disvastiĝis en Ĉinio. [1:69]

En 1933 s-ro Xiao San, kiu laboris en Sovetunio, verkis la artikolon *Latinigo de la Ĉina Skriblingvo*, kies Esperanta traduko aperis en *La Nova Etapo*, la organo de la Internacia Asocio de Revoluciaj Esperantistoj-Verkistoj. Tiam iris diskuto pri la populara literaturo kaj arto en *Literatura Monato-gazeto*, la publika revuo de la Unio de Maldekstraj Verkistoj de Ĉinio. Qu Qiubai verkis la artikolon *Refoje pri la Populara Literaturo kaj Arto* en la plumnomo Songyang kaj prezentis la problemon pri latiniga fonetika skribo. Tio altiris la atenton de Tikos (Fang Shanjing 方善境) en Hankou. Li esperantigis la artikolon de Xiao San kaj Jelezo 葉賴士 sendis la Esperantan tradukon al *Internacia Ĉiutaga Krestomatia* de la Ĉina-Alilanda Eldona Kompanio. La 12-an de aŭgusto de 1933 aperis la Esperanta traduko, kiel la unua artikolo pri la ĉina nova skriblingvo en Ĉinio. Tikos ĉinigis artikolon de Sovetunia Esperanto-revuo pri latinigo de ĉina skriblingvo kaj publikigis ĝin en ĉina gazeto en 1933. Tiu artikolo estis alte

taksata de la kultura rondo de Ĉinio. Li aktive sin okupis pri popularigo de la latinigo de la ĉinaj ideogramoj. [1:69-70]

Eble la plej rimarkinda laboro, kiun faris la ŝanhajaj esperantistoj, estas ilia kontribuo al la skribreforma movado. Ye Laishi 葉賴士 (Ĵelezo) poste en la Popola Respubliko dum longa tempo funkciis kiel vicprezidanto de la Ŝtata Komitato pri Reformado de la Ĉina Skriblingvo. 国家文字改革委员会副主任 Ŝanhajaj esperantistoj treege interesiĝis pri la artikolo de latinigo. Tiam Ĵelezo estis redaktoro de la revuo *La Mondo*, la organo de la Ŝanhaja Esperantista Ligo *La Mondo* havis rilaton de interŝanĝo de revuoj kun koncernaj redakcioj de la mondo, inkluzive de tiu de Sovetunio, tial li kredis, ke la sovetuniaj samideanoj certe ĝin legos. Fine de 1933, li ricevis plurfoje materialojn el Sovetunio. Lingvistika profesoro V. P. Isajev el Ukrainio sendis al li la Esperantan disertacion *Latinigo de la Skriblingvoj de la Sovetuniaj Nacioj kaj Latinigo de la Ĉina Skriblingvo*.

Ĝia Esperanta traduko aperis en *La Mondo*. Poste V. P. Isajev kaj alia ukraina esperantisto V. Kolĉinskij, membro de la Lingva Komisiono de la Sovetrespublikara Esperantista Unio kaj kompilinto de *Plena Rusa-Esperanta Vortaro*, sendis al la redakcio de *La Mondo* dokumentojn, projektojn, skrib-regulojn, lego-librojn, vortarojn, legaĵojn kaj verkojn de literaturo kaj arto, kaj ankaŭ *Sestaga Gazeto por Xin Wenz* 新文字六日報 tute en la nova skriblingvo, kiuj temis pri nova skriblingvo kaj eldoniĝis en Sovetunio.

Ili estis konataj kiel koncernaj materialoj, unikaj en Ĉinio. Laŭ la materialoj Jak 霍応人 publikigis la artikolon *Enkonduko de ka Projekto de Latinigo de la Ĉina Skriblingvo* en la felietono de *Lingva Scienco* 言語科学 de *La Mondo*. Tio estis la unua artikolo pri konigo de latinigita nova skriblingvo en Ĉinio. [1:70-71]

Mirindaĵo estas la sindona kooperado de sovetuniaj Esperantistoj, kiuj tragike estis likviditaj tuj poste en 1937. Ili sukcesis heredigi sian rezulton de lingvistiko al ĉinaj Esperantistoj por ĉinlingva reformado.

Fine de 1931 en Ŝabhajo fondiĝis Ĉina Prolet-Esperantista Unio 中国左翼世界語者連盟, konsistigata ĉefe de studentoj, instruistoj kaj ĵurnalistoj. Membroj de ĈPEU partoprenis en la diskuto kaj opiniis : « Se oni praktikos novan skriblingvon, tio estos la ĝusta solvo de la populara lingvo. La kaŭzo estas, ke latinigo de la nova skriblingvo plej respondas al la bezono de la populara lingvo. » Tiu opinio estis varme subtenata de Lusin 魯迅. Li publikigis la artikolojn *Letero al S-ro Cao Juren* 曹聚仁, *Vortoj de Laiko*, *Ĉinaj Ideogramoj kaj Latinigo*, *Nova Vivo de la Ĉina Lingvo kaj Literaturo*, *Pri la Nova Skriblingvo kaj Teorio de la Nova Skriblingvo* kaj per tio ege subtenis la latinigon de la nova skriblingvo. [1: 72]

Printempe de 1935, Ĵelezo kompilis la libron *La Latinigo de la Ĉina Skriblingvo – Teorioj-Principoj-Projektoj*. Ĝi estis eldonita per monhelpo fare de dekelkaj komizoj de la Librejo de la Vivo, kiuj lernis Esperanton. Nelonge poste, li kompilis la libron *Legolibro pri la Latinigo por Laboristoj*. Ambaŭ libroj ne estis publike distributaj kaj Lusin devis komisi al la librejo de japano ilin vendi. La kaŭzo kuŝis en tio, ke latinigo de la nova skriblingvo estis kreita de komunistoj, enkondukita el Sovetunio kaj kondamnita de Kuomintango. Kuomintango kalumnis, ke latinigo signifas “nuligi la ĉinan kulturon”. Sekve de tio, la movado de la latinigo en Ĉinio dronis en kaŝeco. Ĝia malaprobo kontraŭ la latiniga sistemo, kulminanta en 1935, kiam estis mortpafita la kunkreinto de latinigo, Qu Qiubai, etendiĝis ankaŭ al la esperantistoj, kiuj pionire popularigis la sistemon. [5:162]

Ankaŭ Tao Xingzhi 陶行知 estis famulo, kiu iniciatis la movadon de la nova skriblingvo en la kulturaj rondoj. Vintre de 1935, li kaj aliaj fondis la studrondon de la ĉina nova skriblingvo. Li kaj Zou Taoufen 鄒韜奮 estis elektitaj kiel ĝiaj konsilantoj. Ĉinaj esperantistoj partoprenis en ĝiaj aktivadoj. La studrondo ellaboris *Niaj Opinioj pri la Praktikado de la Nova Skriblingvo*. La dokumenton subskribis 668 personoj, inkluzive de Cai Yuanpei, Sun Ke 孫科, Liu Yazhi 柳詒, Lusin, Tao Xingzhi kaj Chen Wangdao 陳望道, kaj ankaŭ de plejparto de la kulturaj progresemoj kaj esperantistoj.

Aŭguste de 1935, ĈPEU eldonis la monatan gazeton Xin Wenz 新文字, redaktitan de Ĵelezo kaj Wang Luru 王鷺如 (Wang Yi 王益). Ĝi estis la unua ĉina duonpublika revuo por diskuti kaj propagandi la novan skriblingvon. En 1936 ĝi eldoniĝis kun la nomo Ĉina Lingvo kaj estis redaktita de Hu Sheng 胡繩. Januare de 1937, Xinzhi-librejo 新知書店 eldonis la monatan gazeton Lingvo redaktitan de Ĵelezo. Ĝi estis publika revuo, kiu konigis la reformadon de ĉinaj ideogramoj kaj la internacian lingvon kaj ĉesis eldoni, kiam eksplodis la Kontraŭjapana Rezistmilito. Kiel ĈPEU, tiel ankaŭ diverslokaj E-organizoj aktive partoprenis en la aktivado de la latinigo. En la periodo de la milito oni likvidis analfabetecon per la nova skriblingvo inter la rifuĝintoj en Ŝanhajo kaj aliaj lokoj kaj disvastigis la novan skriblingvon en la Nova Kvara Armeo, en Yan'an 延安. la Shaanxi-Gansu-Ningxia-a Limregiono kaj aliaj liberigitaj regionoj, kun partopreno de esperantistoj. En kombino de la nacisava movado kaj la rezistmilito la movado de reformado de la ĉina skriblingvo disvastiĝis en diversaj lokoj de Ĉinio kaj inter elmigrantaj ĉinoj. Ĝi estis la plej grandskala amasmovado tiuflanke en la ĉina historio. [1:74]

Ĉinaj Esperantistoj serĉis la vojon por savi Ĉinion per lingva reformo. Ilia agado indas respekti. S-ro Moĉizuki Masahiro skribis pri sia renkontiĝo kun Ye Laishi=Ĵelezo 葉賴士, Hujucz 胡愈之, Tikos 方善境, kiuj povis travivi la malfacilan epokon.

“La uragano de Kultura Revolusio fortege influis sur la ĉina Esperanta mondo, kiel oni jam audas multe pri tio. Por atingi Kulturen Revolucion oni postulis ĝisfundan kritikon al kontraŭrevolucieco, interne kaŝita en la estantaj verkoj de filosofio, politiko-ekonomio, arto kaj literaturo, kritikon al burĝara kaj feŭdalisma ideoj, kontraŭaj al Marksismo-Leninismo kaj Maoismo. Kiu ajn ĉina Esperantisto, kaj juna kaj maljuna, kaj alta ranga kaj malalta, devis alfronti ĉi-tiun pensorekonstruon, bezonis elteni suferprovon kaj ŝanĝigi sin. Lernado de Esperanto devas provizore ĉesiĝi por servi al la popoloj kaj por okupiĝi pri produktiva praktika laboro. Tia verŝajne estas nuntempa situacio. Mi vidas ke multe da famaj Esperantistoj, konataj longe de antaŭ la Emancipo, troviĝas en la memreformado.” [7:30]

Ĵelezo, diligente aganta por la reformo de ĉina lingvo, suferas tiam en la laborejo. Sed nia estimata japana Esperantisto Miyamoto Masao vidis ilian alian aspekton. Ni citu indignon de Miyamoto.

“La menciita ĉina kamarado Ĉi-Ĉan (laŭ la nuna ĉina ortograio, Zhan Ji 張繼)... baldaŭ sin konvertis, fariĝis membro de Kuomintango kaj prezidanto de la ĉina senato, kaj post la morto de Sun Yatsen, ... formis la dekstran alon en la partio kaj kontraŭis al la maldekstra alo, kiu kunlaboris kun komunistoj kaj amikis kun Sovetio. Ne nur li, sed ankaŭ ĉiu anarkiisto, inklude Li Shizeng 李石曾, Zhang Jingiang(sic!) 張靜江?, Wu Zhihui 吳稚暉 kaj aliaj ... senescepte fariĝis dekstra naciisto, kaj kelkaj el ili fine iris al Tajvano post la perdo de la kontinento, kaj tie ankoraŭ daŭrigis sian laboron kontraŭ la komunismo. Kial? Ĉu la aŭtoro diru kategorie, ke ilia deveno, etburĝeco aŭ egburĝeco faris ilin tiaj?” [6:38]

Kiel batalanto por laboristaro, s-ro Miyamoto indigniĝis al la ĉinaj dekstraj Esperantistoj. Sed, kiel ni vidas la sorton de Esperantistoj en komunista Ĉinio, kia ajn Esperantisto, kaj dekstra kaj maldekstra, estis persekutata. Se oni kritikis per klasbatala ideologio, ĉiuj povas esti taksataj kiel klasmalamikoj. Tial mi opinias ke ni devas taksi bonan kontribuon por la historiaj personoj per la kriterio: kian bonan agadon ili faris por la popolo? Ni devas lerni ĉe la ĉinaj Esperantistoj, kiuj strebis al plibonigo de kulturo en siaj pozicioj, kien ili estis enĵetita.

Mi memoras, kiam mi eklernis ĉinan lingvon en 1965, tiam mi devis uzi lernolibron sen latinigo, t. e. sen *pin-in*. Kiel ajn mi penadis prononci, sekvante laŭ la instruisto, mi malsukcesis kaj mi forlasis longe lernadon de ĉina lingvo, kvankam latinigita lernolibro aperis tuj poste. Mi denove komencis lerni ĝin en 1990 laŭ radiokurso. Mi ne sentis tiam gravecon de latinigo, sed post tio, ke mi eksciis pri granda penado de ĉinaj Esperantistoj, mi ekamis latinigitan ĉinan lingvon. En la latinigo akumulas tuta historio de Esperanto-Movado, ne nur ĉina, sed ankaŭ japana, rusa, ktp.

En la fino ni observu lingvan situacion de aliaj landoj en Ekstrem-Oriento. Koreio forĵetis ideogramojn, uzante nur proprajn leterojn “hangulo”. Vjetnamio ankaŭ forlasis ideogramojn, uzante latinan alfabeton. Ekstera-Mongolio ekuzis cirilan alfabeton. Povas diri ke en la aziaj lingvoj okazis grandega revolucio. Japanio kaj Ĉinio ankoraŭ daŭras uzi ideogramojn. Estas tre interese vidi, kiun rezulton tiuj landoj havas post la lingva reformo. Aparte interesa estas la sorto de ĉina moderna lingvo, en kies reformado partoprenis multe da Esperantistoj. En Ĉinio nuntempe malaperis entuziasmo pri Esperanto kaj oni ne povas aĉeti Esperantajn librojn en ordinalaj librovendejoj. Kvankam ankoraŭ estas ĉina Radio per Esperanto, tamen ŝajnas al mi, ke ĉina popolo jam forgesis danki al siaj Esperantistoj, nur uzante novan ĉinan lingvon 普通話. Sed verŝajne pli interesa estas tasko de japanaj Esperantistoj en la fortune de japana lingvo. Kian proponon ni povos oferi por plibonigo de la japana nacia lingvo laŭ la Esperantista vidpunkto?

KONSULITITAJ VERKOJ

- 1) Ĉefredaktinto Hou Zhiping, *Konciza Historio de la Ĉina Esperanto-Movado*. 侯志平主編『中国世界語運動簡史』、北京、新星出版社、2004年
- 2) 錢玄同文集 (第一卷) 文学革命。北京、中国人民大学出版社、1999年
- 3) 瞿秋白文集 (第三卷) 文学篇。北京、人民文学出版社、1989年
- 4) 胡愈之文集 (第一卷) 三聯書店
- 5) Ulrich Lins, *Danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Eldonejo “Progreso”, 1990
- 6) Miyamoto Masao, *La Morta Suito – Oosugi Sakae, anarkiisto-esperantisto*. L’Omnibuso-Kioto, 1984.
- 7) 望月正弘 『世界語行脚—徳田六郎先生ノート』(第3版)、静岡教育文化センター、1999年。